# Pasta vilaĝo

Platigis avinjo la pastajn tavolojn
por fari treege bongustajn raviolojn.
Alvenas nepeto, rigardas ŝin pete,
li volas da pasto ricevi iomete.
Avinjo al nepo ameme ridetas,
la nepo kaĵolas, ĝentile li petas:
„buleton da pasto, agrable ĝi molas”.
La knabo gluformi vilaĝon tre volas.
Plenumis avinjo la nepan postulon,
nepeto ekĝojis. Kaptinte pastbulon
komencis malgranda konstru-inĝeniero
gluformi vilaĝon en sprita maniero.
Jen staras kabanoj, garbejoj tre vastaj,
en stalo jam henas ĉevaloj tri pastaj,
bovinoj remaĉas la fojnon kaj muĝas,
el eta porkejo porkidoj du fuĝas.
Sur korto florplena anasoj promenas,
el urbo lontana jen buso alvenas.
Sur strato mallarĝa kaj tre malebena
forfalis la rado de buso homplena.
Sed ve! – mankas pasto por fari la radon
kaj ĝi malebligas la pluveturadon.
„Karega avinjo” – la nepo ekdiris...
ne estas avinjo, ŝi simple foriris.
„Ho, kion mi faru? Jen vera rebuso!
Ne povas sen rado veturi la buso”.

La nepo do havas malgajan mienon
kaj pensas: „se ŝiros mi etan pinĉprenon
da pasto, avinjo ne estos kolera,
kaj mi de la zorgo fariĝos libera”.
Do faris nepeto el pasto la radon
kaj krome da bravaj soldatoj brigadon,
tre belan gazonon en mezo de placo,
ĉe kiu fieris la reĝa palaco,
la montojn altegajn, sur suproj kastelojn,
kaj drakon kun dentoj en grandaj makzeloj,
ĉe ĉiuj sep kapoj, sur longaj sep koloj...
Ho ve! Mankis pasto. Ne estos ravioloj.

